



INTENCE SILENTIGITA LUKTO

Okcidento “senpolitikigis” la lukton de la virinoj por marĝenigi la ideologiajn kialojn; la esploristo Dilar Dirik denuncis la “hipokritan kaj sensangan genocidon”.

“Eble la fizika genocido finiĝis, sed la virinoj scias, ke ni suferas ankoraŭ hipokritan kaj sensangan genocidon.” La esploristo al aktivulo Dilar Dirik atentegis observis la sieĝon de la Ŝengal-monto, sed nun ŝi zorge rigardas la rakonton pri tiuj ĉi du jaroj. Ŝi estas verkanta en la universitato de Kembriĝo sian tezon pri la kurda virina movado. Kiel Dirik rimarkigis, la demokrata revolucio de Roĵavo plene atingis Ŝengalon kaj nur du jaroj post la masakro. Tamen, “la internacia komunumo ruze forprenis la ideologian signifon de la jezida lukto”, laŭ la vortoj de la esploristo.

Fakte, la okcidentaj amaskomunikiloj montris la jezidajn virinojn kiel vundeblajn viktimojn. “Oni ĉiam konsideras la mezorientajn virinojn kiel viktimojn. Oni ĉiam uzas la virinojn politike. Oni konsideras ilin pasivaj, kiel objektojn, kiuj ne havas volon. Ili estas la lasta viktimo de la IŜ, la blanka flago montrita de la virinoj al la patriarĥismo”, klarigis Dirik al *Berria* dum aktivaĵo organizita en Donostio de Kunordigasocio Solidara kun la Kurda Popolo(1).

Sed la realaĵo de la jezidaj virinoj estas alia: ili prenis la armilojn, kaj ideologie, socie, politike kaj milite mobilizis sin, sekvanke lecionon de Abdulah Ocalan, fondinto de la PLK(2). Ili kreis la Inajn Protekt-Taĉmentojn de Ŝengalo(3), por venĝi ĉiujn masakrojn. Ne nur al la fizika memdefendo, sed ankaŭ al la filozofia kaj ideologia laboro ili donas eksterordinaran gravecon; la celo estas alfronti ian ajn perforton kaj liberigi la virinojn.

Sed, por la grandaj okcidentaj amaskomunikiloj, la lukto de la jezidaj kaj, ĝenerale, ĉiuj kurdaj virinoj estas tre miriga. “Subite, ili vidis batalantajn virinojn, armitajn, sed ili ne demandis, kial virino prenas armilon en tiu parto de la mondo, kiu estas ŝiaj ideologio kaj politiko.” La amaskomunikiloj prezentis ilin kiel amazonojn, publikigante fotojn de *belegaj* batalantinoj. “Ili ne komprenas, ke la situacio estas tre kompleksa. Ili nenion volas kompreni.” Ĝuste pro tio, ke la inoj ribelis en regiono, kie la “sovaĝa patriarĥismo” regas: en la koro de Mezoriento.

La kurdaj virinoj ne estas membroj de ŝtata armeo. “Usonaj soldatinoj torturis arabojn en *Abu Ghraib*. Tiu ĉi ne estas la sama aĵo. La kurdaj estas memdefendaj taĉmentoj, kiuj volas detrui la militismon, la kapitalismon kaj la patriarĥismon.”

Fakte, por la batalantoj ne plej gravas esti prenintaj la armilojn. “Ili ne volas esti konataj, ĉar ili prenis la armilojn, sed pro siaj ideoj. Virino el Kobano iam diris al mi: ‘Se ci ne scias, kial ci luktas kaj ne estas organizita, ci estas perdita.’”

Okcidento intence simpligis tiun lukton. En multaj ĵurnaloj oni povis legi, ke la ĝihadistoj timas la virinojn, asertante ke, se iu el ili estas mortigata de virino, li ne iros en la paradizon. “Oni volas ridindigi la IŜ-on per ege seksisma maniero. Multaj opinias, ke se virino, tio estas malforta estaĵo, vin venkas, vi restas hontigita.”

Oni devas nur observi la militojn de Sirio kaj Irako por rimarki la efikecon de iuj kaj de la aliaj. La viraj soldatoj de la iraka armeo kapitulacis en Mosulo post nur du aŭ tri tagoj. Kobano, kontraŭe, estiĝis simbolo de la rezistado. “La virinoj eltenis en Kobano, kaj multaj el ili estis tre aĝaj.”

La tialoj de la lukto estas ŝlosilaj por kompreni tiun rezistadon. “Ili ne agas nur kontraŭ la IŜ. La lukto estas pli ampleksa. Ĝi estas ankaŭ kontraŭ la kapitalismo, la patriarĥismo kaj la maljusto.” Tial okcidento senpolitikigas la lukton de la kurdoj, laŭ opinio de Dirik. “Se ili agnoskus tion, klare videblus, ke ilia ideologio kaj tiu de la IŜ samas.”

Ĉiamaniere, laŭ vortoj de Dirik, la IŜ timas pli la virinojn ol la bombojn de la internacia koalicio. “Ne temas pri kliŝo: estas la pura vero. Pro tio, ke la virinoj havas la eblecon mortigi la ideologion de la IŜ.” Ĉar ĝihadisma grupo ne estas nur armea strukturo aŭ politika organizaĵo. “Baze, ties animo kaj korpo estas ekstrema patriarĥisma masklismo. Tiu estas la koro de la IŜ, kaj neniu alia ol la virinoj povas tion venki”.

Kvankam la lukto kontraŭ la ĝihadistoj estis “doloriga”, ĝi estis “gravega” por verki la historion de la virinoj. “Kiel okazis rilate la historion de aliaj virinoj, tiun de la kurdoj oni neniam skribis. La infanoj, kiuj naskiĝis kaj kreskos en Kobano, lernos, ke la virinoj defendis la urbon kontraŭ la IŜ.”

Demokratio sen ŝtato

La virina lukto estas ligita al la PLK de ĝia komenco. “Virinoj estis inter la fondintoj, ĝin gvidis ofte kaj partoprenis en la revolucio.” Se la elstara evoluo okazis dum la lastaj jardekoj. Ekde 1990, Ocalan konvinkis la virinojn havi sian propran armeon. “La celo estis sin protekti disde la viroj ene de la movado mem. Tial Ocalan estas tiom grava en la porvirina lukto.”

Iom post iom, ili komencis organizi sin kaj starigis sian partion. Ne temas nur pri la PLK, sed pri la PLVK(4). “En la gerilo ne estas ekonomia strukturo, ne estas geedzeco... Por la virinoj pli facilas starigi tie aŭtonoman kaj egalecan strukturon. En la socio pli malfacilas.”

Dum la lastaj jaroj, la virina rezistmovado translokiĝis de la montaro en la urbojn. Ankaŭ la PLK faris rimarkindan ŝanĝon kaj ĉesis peti sendependan ŝtaton, por profundiĝi en la “demokratio sen ŝtato”. “Fakte, la virinoj sukcesis subteni siajn strukturojn for de la naciŝtataj strukturoj. Ne estas nur ĉar ni estas kurdaj, sed ĉar ni estas virinoj, ĉar ni volas protekti nian vivmedion kaj ĉar ni volas vivi pace. Ni ne volas eternigi la naciisman lukton.”



La virinoj devas esti maldekstre de la movado, diris Dirik, ĉar ili suferas pli fortan subpremon. “En iliaj komunumoj mem, en la patriarĥisma ŝtato, en la sociekonomia strukturo. Pli facilas mortigi IŜ-anojn ol demokratigi la apudajn virojn.” Tial, por ĉiu civitana konsilio la virinoj havas sian propran korespondan. Kaj ankaŭ ekzistas la funkcio de kunprezidento. “Ni ne volas apartiĝi disde la viroj, sed ni opinias, ke la ambaŭseksaj strukturoj estas la plej fortaj, kaj ke ni devas esti fortaj por ŝanĝi la socion.”



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj).

- (1) Kurdistan Herriarekiko Elkartasun Koordinakundea, en la eŭska.
- (2) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (3) Yekîneyên Parastina Jin ê Şengalê
- (4) Partio de la Liberaj Virinoj de Kurdio (PLVK/Partiya Azadiya Jinê ya Kurdistanê (PAJK).

KLARIGOJ:

Aŭtoro: A. Garcia

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 3-an de Aŭgusto 2016-a.

Tradukis: NXC. Decembro 2018-a. Provlegis: DS.

